WIKIPEDIA

Aragona lingvo

La **aragona lingvo** (propranome *aragonés*) estas latinida lingvo parolata de 10000 personoj en la nordaj valoj de Aragono. Ĝi estas precipe parolata en la komarkoj Ĥazetanio, Alto Gállego, Sobrarbo kaj Ribagorzo. La dialektoj plej orientaj havas trajtojn de transiro al la kataluna. Ankaŭ pluraj personoj lernas ĝin por ke la lingvo ne malaperu.

Ĝi ne havas ankoraŭ oficialan statuson. Malpli ol 10.000 personoj uzas ĝin, kvankam pli ol 30.000 komprenas la lingvon.

Ĝi uzas latinan alfabeton.

La aragona lingvo enhavas tri ĉefajn dialektojn (okcidenta, centra kaj orienta) kaj la *benasqués* aŭ dialekto el la valo de Benás (*Benasque* en la hispana), lingvistike inter la aragona kaj la kataluna.

Aragona	
Aragonés	
Parolata en	Aragono
Parolantoj	10 000
Denaskaj parolantoj	proksimume 30.000
Skribo	latina
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa lingvaro	
Italika	
Latinida	
Ibero-latinida	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Aragono
Reguligita de	Akademio de la Aragona Lingvo
Lingva statuso	3 sendube endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	an
ISO 639-2	arg
ISO 639-3	arg
SIL	ARG
Glottolog	arag1245
Angla nomo	Aragonese
Franca nomo	aragonais
Specimeno	

La Patro Nia:

> *Pai nuestro, que yes en o cielo,*
> *santificato siga o tuyo nombre;*
> *vienga ta nusatros o reino tuyo;*
> *y se faiga la tuya voluntat en a tierra como en o cielo.*
> *O pan nuestro de cada día da-lo-mos huei;*
> *perdona las nuestras faltas como tamién nusatros perdonamos a os que mos faltan;*
> *no mos dixes cayer en a tentación y libera-mos d'o*

Enhavo

Nomo

Gramatiko
- Fonologio kaj grafio
  - Vokaloj
  - Konsonantoj
  - Diakronika evoluado de fonologio
- Morfosintakso
  - Determinantoj
    - Posesivoj
  - Pronomoj
    - Adverbialaj pronomoj
    - Diakrona gramatika evoluado

Historio

Dialektoj

Ortografio

Literaturo
- Mezepoka literaturo
- Moderna epoka literaturo

Vidu ankaŭ

Eksteraj ligiloj

Nomo

La nomo plej uzata estas *aragonés*, nomo kun kia ĝi estas konata tiel municipe kaj internacie.

La filologa tradicio uzas la nomo *navarro-aragonés* aŭ *navarroaragonés* por paroli de la mezepoka lingvo, kiel aliaj latinidaj lingvoj (*galaicoportugués* aŭ *asturleonés*).

> *mal.*
> *De tu ye o reino, o poder y a gloria ta cutio Sinyor. Amén*
>
> **Vikipedio**

Pro la historia divido de la lingvo kaj la ne-ekzisto de uniĝita konsciencio inter la parolantoj de la dialektoj, ĉiu dialekto estas nomata kun la nomo de la municipo kie ĝi estas parolata.

Fabla estas alia nomo tre popularigita en la 20-a jarcento. Ĝi venas de la nomo *fabla chesa*, el la ĉesa dialekto.

Gramatiko

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Gramatiko de la aragona lingvo.

Fonologio kaj grafio

La fonemoj estas inter oblikvaj stangoj / /, la alofonoj de fonemo estas inter kvadrataj krampoj [ ], la ortografio estas en kursivo kaj ĝi adaptas sin al la ortografio de la Akademio de la Aragona Lingvo.

Vokaloj



Grafika akcento *(á, é, í, ó, ú)* indikas pozicio malregula de la tonika akcento.

Konsonantoj

	dulipaj		lipodentaj		interdentals		dentalaj aŭ alveolaj		palataj aŭ postalveolaj		velaj	
	senvoĉaj	**voĉaj**	**senvoĉaj**	**voĉaj**	**senvoĉaj**	**voĉaj**	**senvoĉaj**	**voĉaj**	**senvoĉaj**	**voĉaj**	**senvoĉaj**	**voĉaj**
plozivoj	*p* **/p/**	*b* **/b/** **[b~β]**					*t* **/t/**	*d* **/d/** **[d~ð]**			*c, qu* **/k/**	*g, gu* **/g/** **[g~ɣ]**
frikativoj	*f* **/f/**				*z* **/θ/**		*s* **/s/**		*x, ix* **/ʃ/**			
afrikatoj									*ch* **/tʃ/**			
nazaloj		*m* **/m/**						*n* **/n/** **[n~ɱ~ŋ]**		*ny* **/ɲ/**		
lateraloj								*l* **/l/**		*ll* **/ʎ/**		
vibrantoj								*rr, r-* **/rr/**				
verberantoj								*r* **/r/** (u **/ɾ/**)				
alproksimantoj				*u* **/w/**				*i, y* **/j/**				

Diakronika evoluado de fonologio

Iuj historiaj trajtoj de la aragona en sia evoluado el la latina:

- O, E malfermitaj en pralatinida devenas en la diftongoj [we],[je]:
  - PONTE > p**ue**nt (Hisp. *puente*; Ast. *ponte*; Kat. *pont*; Okc. *pont/pònt*)
  - FERRU > f**ie**rro (Hisp. *hierro*; Ast. *fierru*; Kat. *ferro*; Okc. *fèrre/hèr*)
- Latinidaj grupoj -X-, -PS-, SCj- devenas senvoĉa palatala frikativo *ix* [S]:
  - COXU > coixo (Hisp. *cojo*; Ast. *coxu*; Kat. *coix*; COXA > Okc. *cuèissa/cueisha*)
- Kiel en la hispana, en la kataluna (parte), en la okcitana (parcialment), en la asturia y en galega, V devenas /b/:
  - VALORE > *valor* (Hisp. *valor* [b-]; Kat. *valor* [b-/v-]; Occ. *valor* [b-/v-]; Ast. *valor* [b-]; Gal. *valor* [b])

Morfosintakso

Determinantoj

Posesivoj

La posesivoj faras la determinantan funkcion, kiam ili staras post la difinita artikolo. La determinita nomo povas stari meze de la kombino:

- *O mío campo; a mía casa; a casa mía; etc*.

En iuj okazoj, ĝi ne faras mankon la artikolo:

- *Casa nuestra ye cerqueta d'aquí*.

Kun iuj substantivoj referintaj al proksimaj parencoj, oni uzas ankaŭ la mallongan formon de la posesivo, kiu ne estas akompanata de artikolo:

- *Mi pai; tu mai*.

Pronomoj

Adverbialaj pronomoj

La aragona, kiel multaj latinidaj lingvoj, konservas la latinajn formojn ENDE kaj IBI en la adverbialaj pronomoj: e*n/ne* kaj *bi/i/ie*.

Diakrona gramatika evoluado

Alie ol en la hispana, la latina -B- restas en la imperfekto de indikativo en la dua kaj tria konjugacioj: *teniba* (angl. "he had", hisp. *tenía*, Kat. *tenia*, Okc. *teniá/tienèva*, Gal. *tiña*, Port. *tinha*)

Historio

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Historio de la aragona lingvo.

La aragona lingvo ekspansiis en granda parto de la Iberia duoninsulo dum la mezepoka apogeo de la Aragona Kronlando. Post kiam la reĝa potenco transiris al kastiliaj manoj, komenciĝis konstanta malpligrandiĝo de la lingvolimo internen de la lando. Samtempe, la ĉefurbo Zaragozo, rapide alprenis la lingvon de la nobelaro kaj mem rapide fariĝis fokuso disradianta la kastilian. Tiel, kvin jarcentojn post la ekdekadenco, la lingvon scipovas nur homoj dise en la altaj pireneaj valoj, kie iam la aragona naskiĝis.



Evoluo de la aragona lingvo.

La konstitucia demokratio voĉdonita de la vilaĝo en 1978 signifis pliigon de la kvanto de literaturaj laboroj kaj studoj en kaj pri la aragona lingvo. Tamen, ĉi tiu "renaskiĝo" eble estas tro da malfrua por ĉi tiu lingvo.

Kun la "Leĝo 10/2009, de la 22-a de decembro, pri la uzo, protekto kaj promocio de la propraj lingvoj de Aragono", eldonita en la Oficiala Bulteno de Aragono la 30-a de decembro 2009, la aragona lingvo devenis propa lingvo de Aragono.

Dialektoj

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Dialektoj de la aragona lingvo.

Kiel preskaŭ ĉiuj lingvoj, la aragona ankaŭ havas dialektojn. Oni povas diri ke en ĉiu valo, estas parolata aparta dialekto.

Ĝi ekzistas propono (farita de Francho Nagore) por dividi la lingvo kvar principaj dialektoj:

- Centra
- Okcidenta
- Orienta
- Suda

Por kelkaj lingvistoj, tiuj grupoj estas kompleksa dialektalaj formitaj de kelkaj paroladoj. Por aliaj, tiu kvar grupoj estas la dialektoj de la aragona kaj la ĉesa aŭ la ĉistabina estus komarka paroladoj.

La propono de kvar dialektoj farita de Francho Nagore.

Ortografio

🔍 Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Ortografio de la aragona lingvo.

Aragona lingvo havas tri ortografioj:

1. Ortografio de la Akademio de la Aragona Lingvo.
2. Ortografio de la Socio de Aragona Lingvistiko
3. Grafikaj normoj de Osko je 1987

Komparo inter la tri ortografioj de la aragona			
fonemoj	**Ortografio de la Akademio de la Aragona Lingvo**	**Grafikaj normoj de Osko je 1987**	**Ortografio de la SLA**
/a/	**a**	**a**	**a**
/b/	**b, v** laŭ la latina etimologio. Ex: *bien, servicio, val, activo, cantaba, debant*	**b** Ex: *bien, serbizio, bal, autibo, cantaba, debán*	**b, v** laŭ la latinida etimologio, kiel en kataluna kaj okcitana. Ex: *bien, servício, val, activo, cantava, devant*
/k/	▪ **c** ▪ **qu** antaŭ *e, i*	▪ **c** ▪ **qu** antaŭ *e, i*	▪ **c** ▪ **qu** antaŭ *e, i*
/kw/	Se ĝi estas etimologika 'q', kiel en la kataluna kaj iom en la okcitana: ▪ **qu** antaŭ *a, o*. ▪ **qü** antaŭ *e, i*. Ex: *quan, qüestión*.	**cu** kiel en la hispana Ex: *cuan, cuestión*	Se ĝi estas etimologia 'q', kiel en la kataluna kaj iom en la okcitana: ▪ **qu** antaŭ *a, o*. ▪ **qü** antaŭ *e, i*. Ex: *quan, qüestion*.
/tʃ/	**ch** Ex: *chaminera, minchar, chusticia, cheografía*	**ch** Ex: *chaminera, minchar, chustizia, cheografía*	▪ **ch**. ▪ **j** (**g** antaŭ *e, i*) laŭ la etimologio, kiel en kataluna kaj okcitana. Ex: *chaminera, minjar, justícia, geografia*
/d/	**d**	**d**	**d**
/e/	**e**	**e**	**e**
/f/	**f**	**f**	**f**
/g/	▪ **g** ▪ **gu** antaŭ *e, i*	▪ **g** ▪ **gu** antaŭ *e, i*	▪ **g** ▪ **gu** antaŭ *e, i*
/gw/	▪ **gu** antaŭ *a, o* ▪ **gü** antaŭ *e, i*	▪ **gu** antaŭ *a, o* ▪ **gü** antaŭ *e, i*	▪ **gu** antaŭ *a, o* ▪ **gü** antaŭ *e, i*

h etimologia, muta post la latina	Skribita laŭ la etimologio. Ex: *historia*, *hibierno*	Non skribite. Ex: *istoria*,*ibierno*	Skribita kiel mezepoka aragona kaj kataluna. Ex: *história*,*hivierno*
/i/	**i**	**i**	**i**
/l/	**l**	**l**	**l**
/ʎ/	**ll**	**ll**	**ll**
/m/	**m**	**m**	**m**
/n/	**n**	**n**	**n**
/ɲ/	**ny** kiel en la mezepoka aragona kaj kataluna Ex: *anyada*	**ñ** kiel en la hispana Ex: *añada*	**ny** kiel en la mezepoka aragona kaj kataluna Ex: *anyada*
/o/	**o**	**o**	**o**
/p/	**p**	**p**	**p**
/r/	**r**	**r**	**r**
/rr/	▪ **rr** ▪ **r-** komenca	▪ **rr** ▪ **r-** komenca	▪ **rr** ▪ **r-** komenca
/s/	**s** (ankaŭ inter du vokaloj, neniam *ss**)	**s** (ankaŭ inter du vokaloj, neniam *ss**)	**s** (ankaŭ inter du vokaloj, neniam *ss**)
/t/	**t**	**t**	**t**
-*t* malkomence etimologia, muta en la aragona nuntempa	Skribita kiel en la mezepoka aragona, en la kataluna kaj en la okcitana. Ex: *sociedat, debant, chent*	Ne skribita. Ex: *soziedá, debán, chen*	Skribita kiel en la mezepoka aragona, en la kataluna kaj en la okcitana. Ex: *sociedat, devant, gent*
/u, w/	**u**	**u**	**u**
/jʃ/ (orientaj dialektoj) /ʃ/ (okcidentaj dialektoj)	**ix** kiel grafía apogo por ĉiuj dialektoj Ex: *baixo*	**x** Ex: *baxo*	▪ **ix** (orientaj dialektoj). ▪ **x** (okcidentaj dialektoj). Ex: *baixo* (orienta) = *baxo* (okcidenta)
/j/	▪ **y** komenca kaj inter du vokaloj ▪ **i** en aliaj kasoj	▪ **y** komenca kaj inter du vokaloj ▪ **i**en aliaj kasoj	▪ **y** komenca kaj inter du vokaloj ▪ **i** en aliaj kasoj
/θ/	▪ **z** antaŭ *a, o, u*. ▪ **c** antaŭ *e, i* (en internaciaj formadoj kaj iaj paroloj de greka aŭ araba origino). ▪ **z** en fina posicio (sed **tz** kiel grafio en pluraloj kaj verbaj formoj el *t+s* ke en benaska faras **ts**). Ex: *zona, Provenza, fetz, centro, servicio, realizar, verdatz*.	**z** Ex: *zona, Probenza, fez, zentro, serbizio, realizar, berdaz*.	▪ **z** antaŭ *a, o, u*, en komenca posico. ▪ **ç** antaŭ *a, o, u*, en interna posicio. ▪ **z** en fina posicio. ▪ **c** antaŭe*, i*. ▪ **z** en la internaciaj formacioj Ex: *zona, Provença, fez, centro, servício, realizar, verdaz*.
Cultismos	Ĝi ne estas notataj la asimilado tendencoj.	Se notan as tendencias a	Ĝi ne estas notataj ĉiaj tendencoj al asimilado.

	Ex: *dialecto, extension* kaj *lexico*.	l'asimilación. Ex: *dialeuto, estensión* sed *lecsico*.	Ex: *dialecto, extension* kaj *lexico*.
Notado de la tonika akcento (**en nigro** en la ekzemploj)	Hispana modelo, sole en akutaj, ĝi permesas ne akcentuado. Ex: ▪ *hist**o**ria, gr**a**cia, serv**i**cio* ▪ *mitolochí**a**, cheografí**a**, Marí**a**, rí**o*** ▪ *atenci**ó**n* ▪ *ch**o**ven, cant**a**ban*	Hispana modelo. Ex: ▪ *ist**o**ria, gr**a**zia, serb**i**zio* ▪ *mitolochí**a**, cheografí**a**, Marí**a**, rí**o*** ▪ *atenzi**ó**n* ▪ *ch**o**ben, cant**a**ban*	Portugala, kataluna kaj okcitana modelo. Ex: ▪ *hist**ó**ria, gr**á**cia, serv**í**cio* ▪ *mitolog**i**a, geograf**i**a, Mar**i**a, r**i**o* ▪ *atenci**o**n* ▪ *j**o**ven, cant**a**van*

Literaturo

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Aragonlingva literaturo.

Mezepoka literaturo

La aragona lingvo (ankaŭ nomita navara-aragona en la mezepoka etapo) ne ĝuis, dum sia historio, la literaturan prestiĝon, kiun akiris la aliaj latinidaj lingvoj de la Iberia Duoninsulo.

Ne estos ĝis la 12-a kaj 13-a jarcentoj kiam la aragona komencos havi plej grandan ĉeeston en la skribitaj dokumentoj. De ĉi tiu periodo, elstaras la *Liber Regum* —unua ĝenerala historio kun ampleksa rakonta disvolviĝo en latinida lingvo de Iberio—, Dek ordonoj kaj la *Vidal Mayor*, jura verko kie aperas kompilitaj la foruoj de Aragono. Tekstoj kiel *Razón feita d'amor*, la *Libre dels tres reys d'orient* aŭ la *Vida de Santa María Egipcíaca* prezentas same klarajn aragonajn trajtojn.

Moderna epoka literaturo

La kastilia estas ekde 1500 la unua lingvo por kulturo en Aragono: multaj aragonanoj elstaras skribinte en tia lingvo kaj en la 17-a jarcento la gefratoj Argensola (Bartolomé y Lupercio) iris al Kastilio kaj montris belan uzadon de la kastilia al kastilianoj.

La aragona devenis familia kaj vilaĝa lingvo kaj restis plu en la Pirineoj kie ĝi akiros popolan karakteron. La 16-a jarcento estas malluma: oni ne havas dokumentojn en la aragona, sole aljamiado. En la 17-a jarcento aperis iuj verkistoj kiuj uzos tian lingvon por karakterizi popularajn personaĵojn.

En literara konkurso eldonita en Oska je 1650 oni prezentis tri poemojn en la aragona de Matías Pradas, Isabel de Rodas kaj "Fileno, montañés".

La unuaj *pastoradas* estas de la 16-a kaj 17-a jarcentoj.

Vidu ankaŭ

- Dialektoj de la aragona lingvo
- Lingvistiko
- Listo de lingvoj
- Lingva familio
- Ana Tena Puy, verkistino de la aragona lingvo

Eksteraj ligiloj

- http://www.consello.org
- http://www.fablans.org
- http://www.laragones.com
- https://sites.google.com/site/sociedat/
- http://www.charrando.com
- http://www.arredol.com Arredol - Diario digital en aragonés

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Aragona_lingvo&oldid=6829800"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 07:01, 8 jan. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.